


LA JUNA PENSO

Josef Nevadba

La Tabuo

kaj aliaj noveloj

elĉehigis Adolf S t a ĥ u r a



Enkonduko de la tradukinto	...p. 2
<u>Proceso, pri kiu neniu eksciis</u>	...p. 3
<u>Idioto el Keenemuende</u>	...p. 7
<u>La T A B U O</u>	...p. 11
<u>Cerbo de Einstein</u>	...p. 15

La Juna Penso - F 47 - Laroque-Timbaut

Aŭg. 1971 - N° 79 A

Ĉeĥa verkisto Josef Nesvadba naskiĝis en Prago en la j. 1926. En 1945 li komencis labori en literaturo kiel tradukanto kaj, studante medicinon, li provis verki dramojn. En 1950 estis promociita kuracisto kaj poste praktikis en kelkaj specialecoj, krom aliaj ankaŭ en psikoterapio. Liaj unuaj prozoj, novelaro "La Morto de Tarzano", aperis en 1958. Poste sekvis pluaj libroj: scienc-fikciaj noveloj "Cerbo de Einstein" (samnoma novelo estas ĉi tie prezentata), kaj "Ekspedicio en Kontraŭa Direkto". La pli ampleksa novelo "Dialogo kun d-ro Dong" okazas en Norda Vjetnamio. Nun li preparis por eldono ampleksan romanon "Sekreta Informo el Prago" kaj du detektivromanojn.

La prozoj de Josef Nesvadba sukcesis ankaŭ en aliaj landoj kaj tradukitaj ili aperis en Aŭstrio, Britio, Bulgario, Germanio, Hungario, Sovet-Unio, Usono kaj alilande. Laŭ liaj noveloj estis produktitaj ĉeĥaj filmoj "La Morto de Tarzano", "Idioto el Xeene-muende" (tiun ĉi novelon povas niaj legantoj legi), "La Perdita Vizago", "Mi Mortigis Einstein-on, Sinjoroj," kaj ankaŭ ĉeĥa televido elsendis liajn verkojn dramigitajn. Usona kompanio RAM-Films nun filmas la rakonton "La Vampiro, Ltd."

La literatura verko de Nesvadba estas specifa nur laŭ lia propra maniero. Nesvadba vidas la realaĵojn ĉirkaŭ ni per alia prismo kaj li stimulas rezonadon, erozias tradiciajn ideojn kaj dubeme demandas ankaŭ tie, kie ŝajnas, ke ĉio estis jam dirita.

Ni certas, ke niaj legantoj-esperantistoj de diversaj nacioj, kiuj eble ne havis ankoraŭ la eblecon konatiĝi kun la verko de tiu ĉi eminenta ĉeĥa verkisto, trovos nian modestan elekton tre interesa.


- - - 0 - - -

La tradukinto dankas sincere al la aŭtoro, ke li permesis esperantigi liajn verkojn kaj eldoni ilin senpage.

Mi dankas ankaŭ al kuracisto, s-ro MUDr. Josef Černý en Most, Ĉeĥoslovakio, pro liaj gravaj lingvaj konsiloj.

Kaj fine, al k-do C. Baudé apartenas speciala danko, ke esperantistaro povos legi valorajn novelojn en Esperanta vesto, ĉar li eldonas ilin.

Adolf Staňura.



Proceso, pri kiu neniu eksciis

Aperau la prokuroro finis sian paroladon, profesoro Neumann ¹⁾ ekstaris, ĉirkaŭrigardis al ĉiuj ĉeestantoj, surmetis sian nazumon kaj komencis legi per trankvila voĉo, kvazaŭ li prelegus al studentoj. - Estimata tribunalo, mi estas akuzita, ke mi atakis profesoron Orlov en lia laborejo kaj ekbatis lian kapon per la mikroskopo, tiel farinte al li gravan korpan lezon. Tre mi bedaŭras tion. Laŭvorte, mi volis mortigi profesoron Orlov...

Ĉiuj eksilentis en la tribunala ĉambro. La ĵurnalistoj komencis rapide skribi. Ĉiuj rigardis surprize la akuziton, kiu volas pli endanĝerigi sin per sia pledo. Sed la profesoro parolis senekscite plu:

- Mi prelegas histologion ²⁾ ĉe nia naturscienca fakultato jam de antaŭ plenaj deksep jaroj. Mia katedro ³⁾ situas, kiel vi eble scias, en unu nenova domo de nia universitata urbo, kune kun la katedro de fiziologio. Mi volas diri, sinjorinoj kaj sinjoroj, ke la histologio vegetadas tie, ĉar profesoro Orlov kun siaj fiziologoj jam antaŭlonge forpuŝis nin en subterenajn ĉambrojn, kie ni laboras dum tutaj tagoj ĉe artefarita lumo. Eĉ finance Orlov limigadis min. Mi devis prezentadi al li ĉiujn elspezojn por decido, kvankam li ne estis mia estro kaj nenion sciis pri histologio. Ĉiu scias, ke liajn fakajn nesciojn ekvilibrigas nur lia parenceco kun la kultministro, ⁴⁾ en kies familion li tre lerte aledziĝis. Lia esplora laboro estas verko de liaj asistantoj, kiujn li povas elekti inter junaj sciencistoj, dum al mi restis mia unusola helpanto, la juna doktoro Mach. ⁵⁾ Proksimume antaŭ unu jaro mia asistanto esploris novan nervan farbon, mian propran produkton, kiun mi nomis "etnakronito G." Sed dum laborado super la mikroskopaj histotranĉaĵoj certa parto de la farbo sendube vaporigis kaj kaŭzis al li veneniĝon. Antaŭe ni ne havis eĉ supozeton pri tiaj efikoj de la nova kombinaĵo. Jen temis evidente pri la plej impeta konata veneno, efikanta kiel gaso, kiun oni nepre ne sentas kaj ties enspiro kaŭzas tetaneskajn konvulsiojn de la tuta organismo. Klasika sardona ⁶⁾ rideto trajtis sur la vizaĝo de doktoro Mach, kvazaŭ li mokus pri sia stato. Sed certe li nepre ne emis tion, ĉar lia tuta spino estis streĉita kiel pafarko kaj li tuŝis la plankon nur per siaj kapo kaj plandoj, kiam ni trovis lin. Li ne povis movi sin. Lia vivo estis minacata. Senprokraste mi detruis la venenan farbon, sed samtempe mi postulis denove, ke mia departemento ricevu almenaŭ unu aerumeblan ĉambron, ĉar se ni estus posedintaj tian, la akcidento ne povus okazi.

Post kelkaj monatoj, kiam feliĉe mia asistanto estis jam sana, fine aperis enketa komisiono en nia instituto. Estis du oficistoj en uzobriletaj listrojako ⁷⁾, kiuj komencis arogante enketi min. Ili volis koni la ecojn kaj la specon de la venena gaso kaŭzinta la veneniĝon. Sed mi ja bezonis novan ĉambron. Kaj denove ili demandis severe pri mia etnakronito G. Tio ekŝajnis al mi suspekta. Mi elĵetis ilin.

Post semajno, la kultministro mem venis al mi. Komence mi konjektis, ke li eraris. - Via parenco laboras en la unua etaĝo - mi atentigis lin. - li estas ekipita por akceptadi gastojn...

Sed la ministro venis al mi. Jam oni anoncis al li, ke mi malkovris novan venenan gason. Tre li interesiĝas pri mia laboro.

- Mi estas histologo - mi akcentas - vivaj histoj interesas min, kaj ne la toksoj. La etnakroniton mi malkovris nur hazarde.

Ĉiuj grandaj malkovroj en la mondo estas, li diris, verko de hazardo, tio ne ĉagrenu min, trankviligis min la ministro. La registaro intencas aĉeti de mi mian preparaĵon. Senprokraste ĝi volas komenci fabrikadi ĝin. Mi ne komprenis, kial. Oni ja ne povas per ĝi ekstermadi ratojn aŭ insektojn, oni nek vidas nek sentas la etnakroniton, ĝi estus tro danĝera al la homoj.

- Sed ĝuste tial - kulturite ridetis la kultministro. Ni bezonas la batalgason. Ni bezonas la novan armilon.

- Ĉu armilon? - li hororigis min. - Sinjoro ministro, ne forgesu, ke nun oni skribas la jaron 1914. La civilizitaj nacioj jam delonge ne militas inter si. Tion lasu al la balkananoj kaj al la buroj⁸⁾. La disvolvo de la civilizo kaj de la scienco ridindigis la militon. Mi opinias, ke Franz Joseph⁹⁾ konservas la armeon nur tial, por ke en nia ŝtato ekzistu ankoraŭ iu alia antaŭdiluvia institucio krom la imperiestreco.

- Vi ne orientiĝas en la politiko, kara amiko - la ministro nepre ne ofendiĝis - La nuntempa mondsituacio estas ekstreme streĉita. Niaj rilatoj al Ruslando estas ĉiam pli malbonaj. Kaj ĝuste pro Balkano. La serboj ekintencis konstrui grandan ŝtaton, kiu unuigos ĉiujn sudajn slavojn; ili volas aliron al la maro, pro kio baldaŭ falus en iliajn manojn tuta nia dalmatia bordo. Jam unufoje ni rifuzis tiujn ĉi pretendojn, lastfoje ĉe la starigo de la albaniaj limoj kaj ĉe la Skadar-incidento¹⁷⁾, sed se la Nigra Mano, kiel sin nomas la naciista serba organizo, alpaŝos al pluaj agoj, Aŭstrio ne silentos. Ni faros lecionon kaj al ili kaj al la rusoj pri tio, kiu havas la rajton en Balkano. En tiu afero, nin subtenos Germanio, kiu havas siajn malakordojn kun Francio kaj Anglio. En Afriko, oni devas redividi la koloniojn. La germanoj ne kontentiĝos per la malnova portugala resto en Angolo, kiun al ili promesis la angloj. Ankaŭ la nafto en Mosul¹⁸⁾ kaj la anglaj interesoj en Ŝat-el-Arab¹⁹⁾ jam delonge allogas ilin. Oni atendas mondkonflikton. Milionoj interbatalos.

- Pro Skadar aŭ pro Ŝat-el-Arab? - mi demandas. Tio ne estis klara al mi. Neniam mi interesiĝis pri politiko.

- Pro la imperiaj interesoj - grave diris la ministro.

Mi imagis la milionojn da soldatoj, kuŝantaj en konvulsioj, el kiuj ni lastmomente savis la kolegon Mach.

- Vana parolo - mi diris - se vi volas militi, vi havas la sabrojn por tio, bonvolu servi al vi. - Mi devas mencii, ke la ministro venis al mi en sia ofica uniformo, ornamita per oro kaj arĝento, kun mallonga spadeto ĉe la zono. - Mia gaso ja ne distingus soldatojn de civiluloj. Kaj tial ĝi estus neniel utila al vi.

- En la venontaj militoj ne estos diferenco inter la soldatoj kaj la civiluloj - diris la kultministro. - Mi komprenas vian hororigon, sinjoro profesoro, ankaŭ mi estas humanisto. Sed tial la progreso ne haltos. Ni militos per ĉio, per longdistancaj kanonoj, flugmaŝinoj eĉ batalgaso. Kaj se oni malkovros post vi la etnakroniton aliloke en la mondo, certe oni disponigos ĝin al sia armeo. Do, kion vi gajnos, se vi rifuzos doni ĝin? Ĉu kelkan tempon? Ĉiuj fingromontos vin kiel perfidulon. Kaj finfine eble la malamiko venenos vin per via propra gaso. Dume, en mala kazo vi fariĝos riĉa kaj merita viro. Via instituto estos la unua en la ŝtato, vi havos ĉiujn sociajn honorojn, ni plialtigos vin en la nobelan rangon. Konsideru vin gajninto en la loterio de la scienco. Vi mem diras, ke vi malkovris tiun ĉi materion hazarde. Do, kian respondecon vi havas? Kian respondecon havas homo, kiu hazarde gajnas milionon? Morgaŭ povas gajni iu alia.

Sed mi elĵetis lin same kiel liajn oficistojn. Mi povis apenaŭ ekkompreni tion. Li forveturis en kaleŝo kun livreita servisto. Momente mi pensis, ke li estas freneza. Kaj poste mi alportigis al mi ĵurnalojn. Mi ne legis ilin dum tutaj lastaj jaroj. Nun mi faris nenion alian dum semajno. Laŭvere statis, kvazaŭ parto de la homaro frenezus, dum ni provas trovi la leĝojn de la naturo, malkovri novajn medikamentojn, savi malsanulojn kaj konkuri la sekretojn. Grey, Poincaré, Sazonov, Wilhelm, Hötendorf, Hoyos¹⁰⁾ - unufoje mi legis pri tiuj sinjoroj.

Post tri tagoj eksonis la pafoj en Sarajevo. La Nigra Mano mortigis sian malamikon kaj la eblan tronsekvanton, Aŭstrio sendis ultimaton. Ĝi postulis malpermeson de la kontraŭaŭstria propagando, disigon de la kontraŭaŭstria organizoj, maldungon de la kontraŭaŭstria oficistoj, oficiroj kaj instruistoj, implikitaj en la kontraŭaŭstria agado kaj propagando, kaj decidi pri tiuj personoj rajtus la aŭstria registaro, kiu partoprenus la esploron kaj la punadon de la atencokulpuloj en Sarajevo. Tio signifas, ke oni postulis morton de la estro de la Nigra Mano, de kolonelo Dragutin Dmitrijević, kaŝnome Apis. La milito eksplodis.

Kaj samtempe ankaŭ la kampanjo kontraŭ mi. Oficiale oni ne publikigis ion, sed aperis onidiroj, ke mi rifuzis disponigi gravan inventon al la armeo. La studentoj prifajfis min ĉe la prelego, kolego forstrekis min el la redakta konsilantaro de sciencia gazeto kaj Orlov proponis al doktoro Mach la profesorecon pri histologio, kiu verŝajne baldaŭ vakos.

Dume eĉ Ruslando, Germanio, Francio kaj Anglio lanĉis la militon. Regimentoj da junaj viroj viciĝis ĉe la stacidomo de nia urbo. Kaj ankaŭ la garnizono de la dragonoj ekmarŝis al la batalo. Kun briletantaj kaskoj, blankaj manteletoj, lumantaj sabroj kaj okulfrape ruĝaj akcesoraĵoj, por ke la malamika maŝinpafisto povu pli bone celi. Kaj eble ili pensis, ke tiu ilia parado estos utila. Post du monatoj, eĉ unu el ili ne vivis plu.

La dragona garnizono estadis fiero por nia urbo. Al mi ĝi rompis la edzecon. Mia edzino post du jaroj forkuris kun kapitano Imre Kovács ¹¹⁾ en Salgotaryán-on ¹¹⁾. Eble de tiu tempo mi ne amas la soldatojn. Kaj la dragonojn speciale. Tiam mi forlasis nian loĝejon kaj mi ne eliradas el mia keletaĝa laborejo. Mi dormas tie, la servistino alportadas al mi la manĝaĵojn el la restoracio. Mi estas senpretenda. Nur sporade, kiam estas dimanĉo aŭ festotago, aŭ kiam miaj okuloj tiel doloras, ke mi ne plu povas legi la sciencan literaturon, tiam mi iradas al doktoro Mach, por amuziĝi kun liaj infanoj. Li estis mia unusola amiko. Kaj li ne trompis min. Li rifuzis la proponon de Orlov. Do oni devis lasi min en la posteno. Ĉu iu zorgas pri histologio? Kvankam iam ankoraŭ oni ĵetis koton sur min, aŭ sendis minacan leteron, la eventoj nun rapide forgesigis pri ĉio. La rusa fronto kaj la germana antaŭenmarŝo unualoke. Oni komencis voki la rezervulojn. Mian asistanton inter la unuaj. Evidente Orlov ordonis tion venĝe. Oni komandis lin al konstrutaĉmento. Mi akompanis lin al la stacidomo. Ĉe adiaŭo, lia sesjara fileto demandis min:

- Kaj ĉu estas vero, ke - se oni havus la gason - la paĉjo revenus post semajno?

Ili devis ofte paroli hejme pri tio. Finfine li eble ne konsentas kun mi? Sinjorino Mach estis svenanta. La ceteraj virinoj ploris, kriis, ŝiris siajn harojn aŭ skrapis vizaĝojn, kvazaŭ en iu antikva tragedio. La stacidomanoj jam kutimis pri tio. En aparta ĉambro ili surverŝis la virinojn per akvo. En mia vivo mi ne vidis tiom da larmoj kaj sufero, kiom ĉe la forveturo de mia asistanto. Antaŭ la stacidomo promenis iu oficiro. Malŝate li rigardis min. Li estis Imre Kovács. La dragona majoro. La majoro. Fine li atingis sian celon. Li estis translokita en nian urbon kiel batalionestro.

- Nieder mit den Serben! ¹²⁾ - li kriis kun aliaj oficiroj kaj ŝvingis la sabron.

Iumomente mi pensis, ke ĉio estas nur febra sonĝo, malbona farso, el kiu mi devas vekigi. Sed neniu ridis. Eble nur la morto. Post monato ni ricevis informon el Galicio ¹³⁾, ke doktoro Mach falis. Lia edzino venis al mi kaj kulpigis min. Laŭ ŝi, mi kulpas pri ĉio. Se mi estus disponiginta mian gason, mia asistanto povus trankvile labori malantaŭ la fronto. Ŝi opiniis tion serioze. Mi, mi, kiu rifuzis partopreni ĉi ĉion, estas laŭ ŝi kulpa. Ja profesoro Orlov sendis lin for! Orlov mortigis al mi mian plej proksiman lernanton, mian tronsekvanton! Tiam venis al mi la ideo pri ĉio. La sekvan tagon mi mem iris al la kultministro.

- Mi volonte disponigos la etnakroniton G. Sed antaŭe mi bezonas ankoraŭ fari kelkajn provojn...

- Ĉion vi havos je dispono, kara patrioto - la ministro nomis la sumon. Per ĝi mi povus konstrui tutan urbon por la histologio. Sed ili volis la venenon. Por ŝirmi la

domon mi ricevis kompanion da soldatoj. Mi petis, ke majoro Kovács estru ĝin. Tiel li nome venis sub mian komandon. Samtempe oni sendis al mi unu belan sekretariinon kaj unu alian, kiu efektive laboras, dek novajn asistantojn, el kiuj eble kvar estis membroj de la kontraŭspionado, kaj dudek laboratorianojn. Ni interpremiĝis en miaj ĉambretoj sub la tero, memkompreneble ni ne povis labori. Krome ankoraŭ en la koridoroj piedis la dragonoj, kvazaŭ ili atendus ĉiumomente la serban invadon. Mi postulis novajn ĉambrojn. Mi volis por mi tri etaĝojn. Mi ultimatis al la katedro de fiziologio. Alian domon mi rifuzis.

Mi postulis, ke oni liberigu por mi la domon je la sesa hero. Kaj tujan malpermeson de ĉiuj paroloj, malŝatigantaj la histologion (plue "paroloj kontraŭhistologiaj"), maldungon de kontraŭhistologiaj laboruloj, laboratorianoj, asistantoj kaj ordigistinoj, esploradon pri la kontraŭhistologia agado de la tuta katedro kaj punojn por la kulpuloj, kiuj kaŭzis la malfaciligadon de mia laboro kaj morton de mia asistanto. Tio signifas punon por Orlov. Mi mem volas partopreni la tutan esploradon...

Iuj novaj asistantoj opiniis, ke tio estas ŝerco. Sed baldaŭ mi frapegis ilin. La ultimaton forportis Kovács kun tri dragonoj. Ili tremis antaŭ mi. Ja mi protektas ilin, pro mi ili ne devas iri al la fronto!

Orlov telefonis post momento. Li estas surprizita... Li ne komprenas... Li volentas interkompreniĝi...

- Ĝuste same parolis la serba registaro - mi ekbatis per la parolilo. Eĉ nun ili ne komprenis. Mi atendis ĝis vespero. Poste mi ekkomandis.

- Nieder mit den Physiologen! 14) - kriis Kovács kaj kun siaj dragonoj svingis la sabron. Ili komencis elĵetadi el fenestroj la provtubetojn kaj karajn mezuraparatojn, liberlasis kuniklojn, katojn, musojn, hundojn kaj ĉiujn ceterajn provbestojn. Estiĝis efektiva tumulto, kvazaŭ en la milito. Miaj kunlaborantoj persvadis min.

- Ĉu vi volas agresi ilin pro kelkaj ĉambroj?

- Kaj ĉu vi scias, kio estas Ŝat-el-Arab, Angolo, aŭ Skadar? Oni diris al mi, ke la mondmilito ne eksplodis pro io pli grava. - Mi prenis mikroskopon kaj mem ekiris al mia Apis, nome al profesoro Orlov. Ĝus li telefonis al sia onklo, kion mi faraĉas. Mi faraĉis ion ankoraŭ pli interesan. Mi disbatis lian kranion per la postamento de la mikroskopo. Bedaŭrinde mi ne mortigis lin. Tion mi bedaŭras. Ĉar ĉiutage sur ĉiuj frontoj estas mortigataj miloj da homoj, laŭ la sama logiko, laŭ kiu mi agrosis la fiziologojn. Ĉiu paŝo, kiun mi faris, estas komparebla tute precize kun tio, kion faris Hötendorf kaj Berchtold 15), Wilhelm kaj Grey aŭ Pašič. Kaj tamen, iliaj faroj ŝajnas frenezaj al neniuj. Ne esploris ilin la psikiatroj kiel min, ili ne estis mal-liberigitaj, des malpli juĝataj. Kvazaŭ milito estus io tute alia ol murdo. Sed, sinjorinoj kaj sinjoroj, la verdikto, kiu trafos min, falos eĉ sur iliajn kapojn. Mi ne faris ion alian ol ili. Se mi estas krimulo, ili estas murdistoj.

Jen oni interrompis la profesoron. Almenaŭ la sekreta protokolo, kiun oni malkovris antaŭ nelonge en la arkivo de la lando Moravio 16), ne daŭrigas plu. La ĵurnalistoj, pri kiuj estas mencio en la protokolo, evidente ne skribis eĉ unu linion. Neniu eksciis pri tiu ĉi proceso. Eble ĝi eĉ ne interesis iun. De tiu tempo ja okazis tiom da aferoj. Antaŭ ĉio, du mondmilitoj.

Notoj de la tradukinto: 1)legu: nojman - 2)netrovebla en PV: scienco pri histoj; histologo: sciencisto de tiu fako - 3)katedro: parto de fakultato (en PV tiu ĉi signifo ne estas indikita) - 4)en Aŭstrio-Hungario ekzistis "Ministerium für Kultus und Unterricht" (ministerio por religiaj aferoj - t.e. la "Kulto"- kaj instruado) - 5)legu: maĥ - 6)netrovebla en PV: medicina esprimo por malsanece ridanta mieno - 7)listro (netrovebla en PV): ŝtofo, el kiu oni kudris somervestojn virajn (germ. Lüster) - 8)sudaŭrika popolo, nederlanddevena. - 9)tiama aŭstria-hungaria imperiestro, nask. 1830, regis de 1848 ĝis sia morto 1916, legu franc jozef - 10)legu (proksimume): grej, puenkare, vilhelm, hecndorf, hojos - 11)legu kovaĉ; ŝalgotarjan (urbeto en Hungario) - 12)germane: For la serbojn! - 13)suda parto de Pollando (tiam parto de Aŭstrio-Hungario) - 14)germane: For la fiziologojn! - 15)legu berĥtold - 16)meza parto de Ĉeĥoslovakio - 17)Skadar, albane Shkodër, urbeto en Albanio kaj samnoma lago sur limo de tiu lando kun Jugoslavio 18)urbo en Irako - 19)rivero enfluanta Persan golfon.

Idioto el Xeenemuende ¹⁾

Oni redonis lin al la gepatroj jam el la unua klaso, ĉar li estis neatentema, forgesema, distriĝema kaj senĉese nur interbatis, ja li eĉ ĵetis inkujon sur instruiston. Klara kazo de oligofrenio ²⁾, la kuracistoj donis neniun esperon. Kaj tamen la edzino de inĝeniero Habicht ³⁾ plej amis ĝuste ĉi tiun infanon. Ŝi malkovris, ke li havas talenton por ciferoj, kaj antaŭ la milito ŝi salajris por li guvernistinon, aĝan sinjorinon, kiu ĉiutage zorgis pri li. La mensmalforta knabo nomiĝis Bruno.

Pri li rakontis al mi mia parenco, kiu dum milito devige laboris en Xeenemuende kaj loĝis tie ĉe sepdek-jara profesoro. Tiu ĉi instruisto estis anstataŭonta la severan guvernistinon ĉe la familio Habicht, post la mistera aeratako la kvaran de oktobro. Ĝis tiam, Xeenemuende restis sen unusola interveno de aliancaj bombaviadiloj. Ankaŭ ne ŝajnis, ke ie estus iaj gravaj objektoj. Nur la fabriko sub la tero, kie oni fabrikis ion sekretan, neniun sciis kion. Nokte la kvaran de oktobro falis unu etkalibra pafaĵo rekte sur la dometon de la guvernistino de Bruno kaj mortigis ŝin, ĉar la maljuna sinjorino loĝis sola. Kaj ĉe la komandejo oni ĵurasertis, ke vaste ĉirkaŭe estis neniun malamika aeroplano. Oni parolis pri trafo per longdistanca kanono. Sed kial la anglaj longdistancaj kanonoj de Dover alpafus la dometon de la guvernistino de Bruno, neniun sciis.

La maljuna instruisto volonte akceptis la proponon de sinjorino Habicht. La pensulo kromgajnis monon per privata instruado, ĉar li ne ĉiam havis sufiĉe da mono, por ke li povu aĉeti almenaŭ terpomojn nigramerkate. Sed oni ne diris al li, ke Bruno estas idioto. Tion li konstatis nur ĉe la unua renkontiĝo. Bruno estis dekkvinjara knabo kun fizionomio de sesjarulo kaj kun iuj kutimoj de beboj. Dum la leciono li kapablis ĵeti sin post muŝon kaj senprokraste engluti ĝin, en la nazon puŝi fontplumon, aŭ surverŝi la pantalonon de la instruisto per kafsurogato, kiun por li kuiris sinjorino Habicht. Memkompreneble la instruisto tuj leviĝis kaj volis foriri. La malespera patrino devis longe persvadi lin, plialtigis al li la honorarion kaj promesis, ke ŝi kuiras por li vespermanĝojn, se li zorgos pri Bruno. Kaj kvazaŭ la knabo subite volus flatgajni lin: li starigis sin atentpoze antaŭ la instruisto kaj laŭte citis la grandan multiplikon, dividon eĉ malpotencigon.

- Li havas miregigan memoron por ciferoj. Li memortenas ĉion - diris lia patrino.
- Li scias parkere la tutan telefonlibron de Xeenemuende. - Kaj Bruno lerte citis la unuajn sesdek numerojn eĉ kun adresoj de la telefonposedantoj. Sed la regulojn de la gepatra lingvo li ne konceptadis, la historion li ne kapablis lerni, ja eĉ frazon li ne kapablis tralegi. Tiel, mi petas, preskaŭ en la dekkvina aĝojaro. La profesoro ĉiam nombris la minutojn ĝis vespermanĝo, neniam en la vivo la leciono ŝajnis al li tiom longa kaj neniam li tiel malvolonte iradis al la lernanto.

Proksimume unu monaton poste, li trafis Brunon interbatantan sur la strato kun tuta aro da pli junaj infanoj. Li kapofrapis la okjarajn knabetojn, submetadis al ili piedon kaj piedbatis ilin, kiam ili kuŝis sur la tero.

- Bruno! - la profesoro kriis jam de malproksime, sed li ne povis kuri, li spiris malfacile, kaj tial la idioteton malsovaĝigis nur viandistino, kiu rimarkis la tutan scenon el sia butiko vid-al-vide. Ŝi kaptis lin ĉe la kolumo - muskola virino - kaj simple lin ĵetis trans muron en ĝardeneton de la vilao de Habicht. Poste ŝi invitis la infanojn ĉe sin kaj lavis iliajn skrapvundojn.

- Tion ĉi li faras ĉiumomente, - ŝi klarigis al la surprizita profesoro. - La idiototo. Li konvenas por instituto. Se lia paĉjo ne postenus tiel alte, do jam antaŭlonge oni estus forveturiginta lin. Ja ĉiuj miras pri vi, ke vi iradas al ili.

Sed la vespermanĝo estis ĉi-tage ĉe Habicht speciale abunda kaj en la kafsuregato oni sentis kelkajn kernojn de ĝusta kafo. Ja eĉ Bruno kondukis trankvile kaj nur spiteme observadis unu lokon en angulo de la ĉambro, tial la instruisto denove ne kuraĝis fari la maldungiĝon.

Ĉi-nokte la tuta urbo estis denove ekscitita pro nova katastrofo. La butikisto de la viandistino, kiu loĝis vid-al-vide al Habicht, estis detruita sammaniere kiel la domo de la guvernistino: per etkalibra bombo aŭ per kanongrenado. La pafaĵo devis evidente traflugi la fenestron, eksplodis nur en la ĉambro kaj detruis ĝin. La viandistino estis bruligita.

La duan tagon Bruno ridetis dum la tuta leciono. La instruiston kaptis angoro.

- Kiu fakte priatentas vian knabon dum la tuta tago? - singarde li demandis al sinjorino Habicht ĉe la vespermanĝo.

- Neniu. Li estas kolose brava. Li ludas malantaŭe sur verando, la edzo ekipis por li siaspecan metiejon.

- Mi ŝatus rigardi tien.

- Ne, - elgorĝigis la knabo per obtuza kaj furioza voĉo, tuta li ruĝiĝis.

- Neniun li enlasas, - klarigis la patrino. - Tio estas lia propra reĝlando, - kaj ĉe tio ŝi konspire palpebrumis al la instruisto. - Fojfoje mi observadas lin tra la ŝlosiltruo, - ŝi aldonis, akompanante lin al la barilpordeto. - La tutan tagon li ludas per infanaj konstruelementoj por junaj teknikistoj. Kaj per kelkaj aĵaĉoj, kiujn al li alportis la edzo el la fabriko. Ĝi estas nepre sendamaĝa amuzado.

- Ĉu tiel vi pensas? - diris la instruisto kaj rigardis ankoraŭfoje la forbruligitan dometon de la viandistino. - Ĉe tiaj infanoj oni ne scias. Ja li estas malsana. Li devus iri en instituton...

Sed per tio li terure incitis sinjorinon Habicht. Do eĉ la profesoro jam aliĝis al la najbaroj, kiuj malamas Brunon.

- Ho ne, vi eraras, mi eĉ ŝatas lin certgrade. Mi bedaŭras lin. Sed mi pensas, ke li estus pli feliĉa en la instituto.

- Neniam! - decide piedfrapis sinjorino Habicht. - Kiel longe mi vivos, do ne!

Tial la instruisto decidis venonte mem kontroli la laboratorion de Bruno. Li trairis la dompordon rekte al la verando. La knabo eĉ ne ŝlosis la pordon. Li turmentis tie malgrandan kunligitan katidon per faradiza aparato. La besto estis jam preskaŭ duonmorta kiam la profesoro savis ĝin. Bruno ne volis eldoni ĝin al li. Silente ili interluktis, la knabo gruntis strangajn sonojn kaj ĉe la profesoro denove komencis kordoloroj. Restis nur energia interveno. Li batis Brunon en la kapon. La knabo nur saltis en angulon kaj malame rigardis lin.

- Krumm! - li ekkriis. - Ci Krumm! - La estinta guvernistino de Bruno nomiĝis Krumm. La nomo de la profesoro estis Brettschneider 4). La knabo bone sciis tion. Lian instruiston atakis stranga teruro. Li lasis fali la katidon sur razenon kaj foriris. Hodiaŭ li eĉ ne komencis la lecionon. Li evitis renkontiĝon kun sinjorino Habicht. Li iris fabrikon al ŝia edzo.

Oni kondukis lin tra longaj subteraj koridoroj, du sentineloj antaŭ li, du post li, jen estis loĝloko de supernatura insekto. Inĝeniero Habicht akceptis lin malpacience.

- Mi scias, ke mia filo kulpas pri iuj aferoj. Li estas knabaĉo. Sed kiel li povus kulpi pri ambaŭ katastrofoj de antaŭ nelonge, tion mi ne komprenas.

- Ni vidos, - diris al li la instruisto. - Eĉ por ĉio en la mondo mi ne iros hodiaŭ dormi en mian loĝejon. Vi povas gardi kun mi en ĝardeno. - La profesoro nome loĝis en

malgranda vilao apud la stacidomo.

- Pardonu, mi havas aliajn zorgojn. Kaj pli gravajn... rifuzis inĝeniero Habicht.

Sed matene li alkuris. Ĉar nokte estis detruiita la loĝejo de la profesoro per malgranda pafaĵo, kiu eksplodis ĉe lia lito. El la ĝardeno la profesoro klare vidis lumantan balistikan kurbon de la ŝargaĵo, kiu ne estis pli granda ol lia manplato kaj postlasis fuman spuron.

- Senprokraste mi iras al la urba komandejo, - li sciigis al Habicht. - Ĉu vi ne volas iri kun mi?

Tiam estis komandanto majoro von Schwarz 5), al kiu ankaŭ la fabriko estis subordigita. Ili sukcesis veni ĝis li.

- Eksterordinara historio. Vere nekredebla. Kaj ĉu vi konfesas tion ebla? - turnis sin von Schwarz al inĝeniero Habicht. - Ĉu vi pensas, ke via filo efektive povus kulpi pri la katastrofoj?

Habicht balbutis, ruĝiĝis kaj paliĝis, ne sciis kion diri, ĝis kiam von Schwarz ekkriegis al li.

- Mi devas konfesi al vi, majoro, - diris la inĝeniero, - antaŭ monato mi alportis hejmen la planojn de nia nova sekreta armilo, Vergeltungswaffe zwei 6). Tiam ni havis tiom da laboro en la konstrusekcio, ke normala labortempo ne sufiĉis. Eble la knabo iel enrigardis la paperojn. Li memoras amasegon da aĵoj. En iuj aferoj li estas tute lerta. Neniu povas diri nepre certe, kio okazas en lia cerbujo...

Tiu ĉi informo decidis pri la plua sorto de la instruisto. Ĉar li eksciis la sekreton: kiaj armiloj estas fabrikataj en la ĉi-tiea fabriko. Kaj la bubo de inĝeniero subite valoris pli ol lia denuncanto. La instruisto malaperis en koncentrejo. Per tio li estis fakte savita.

- Ja li tamen devus esti geniulo, - diris von Schwarz, kiam ili veturis al Bruno kun Habicht kaj komandeja kuiristo.

- Li estas idioto, - diris Habicht, - pri tio ni posedas kuracistan ateston.

- Ĉu vi ne konsciiĝis, vi kapo malsprita, kion solvis via infano? Vi mem kaj dudeko da al vi similaj ne kapablas fari, ke niaj raketoj flugu al certa celo, vi ne kapablas alceligi ilin. Kaj jen dekkvinjara bubo el distanco trafas fenestrojn je duonmetro precize! Ĉu vi konceptas, kiel grave estus, se faŭ zwei 6) povus detrui certajn celojn en Londono kaj ni ne devus pafadi ĝin tien nur tiel hazardotrafe?

Habicht eksilentis.

- Sed la planojn pri celtrafado mi neniam alportis hejmen.

- Certe. Tiaj planoj eĉ ne ekzistas. Tio estas verko de via knabo... - Kaj von Schwarz ordonis al la kuiristo, ke li elpaku la sukeraĵan varon. Unuafoje post kvar jaroj da milito la viro denove ŝaŭmkirlis kremon por pariza torto, plenigis ĉerketojn 7) kaj buterigis kremon por malakov-tranĉaĵo 7).

Bruno komencis manĝi la bonaĵojn samkiel porkaĉo. Rekte per kapo, li fosis per nazo inter la dolĉaĵoj kaj ornamitaj tortoj, la kuiristo rigidiĝis kaj sinjorino Habicht ĝemis, ke li difektos sian stomakon. Nur von Schwarz atendis trankvile. Fine la knabo ruktis. Li volis foriri.

- Atendu, - retenis lin la majoro per fera pugno. - Ĉiutage vi havos la bonaĵojn, kiam vi diros al ni, kiel vi efektive faras tion?

- Kion? - anstataŭ li demandis la patrino. - Nenion li faras, li estas brava knabo. - La majoro forpuŝis ŝin impete al muro.

- Kiel vi alceligas viajn raketetojn? - ekkriegis li en la orelon de Bruno. - Konfesu tion, aŭ mi dishakos al vi la postajon! - kaj li eltiris el tibiingo sian malnovan reitpeitsch 8). Li svingis ĝin en aero kaj sinjorino Habicht svenis. Neniu rekonsciigis ŝin. La knabo spite rigardis en angulon de la ĉambro, per sia iom tro granda lango

delekis restaĵojn de la bonaĵoj, kiuj restis sur lia mentono. Evidente li komprenis nenion. Eĉ li ne defendis sin, kiam la majoro lin batis. Li mienis ĉiam egale.

Von Schwarz ĉe la fino rompis la rajdvipeton, ŝvitis kaj spiregis. Li lasis la knabon, rektiĝis kaj ekkriis al la gepatroj:

- Aŭ vi scios matene, kiel la ulaĉo faras tion, aŭ la tuta familio iros antaŭ la militan tribunalon. Eĉ kun parencaro, - li aldonis de apud la pordo.

Antaŭ la domo jam elsaltis la SS-viroj ⁹⁾ kaj posteniĝis preter la fenestroj. Von Schwarz insultis ankoraŭ en la aŭtomobilo. Je tiu vespero li ne plu veturis en sian kancelarion en la urbdomo, li veturis dormi inter la soldatoj. En la urbdomo restis lia ĉarma sekretariino, kiun li alveturigis el Italio ĉe la militkomenco.

Nokte ŝi pereis kun la aliaj, ĉar la urbdomo estis detruita per malgranda pafaĵo, kiu traflugis ĉi-foje la tegmenton kaj forbruligis la tutan domon ĝis fundamentoj.

En la kazerno estis anoncita alarmo, la majoro alzonigis sian pezan pistolon marko Parabellum kaj forveturigis sin al la vilao de Habicht.

- Kie estas Bruno? - seke li demandis la inĝenieron. Per tremanta voĉo la gepatroj respondis, ke la knabo foriris dormi. Ili trovis lin sur la verando ĉe la reletoj. kiel li muntas pluan raketeton en la infana pafstableto.

Von Schwarz pafmortigis lin de malantaŭe, per nukpafo. Sinjorino Habicht ĵetis sin sur lin. Ŝi volis eltiregi al li la pistolon, ŝi frenezis pro doloro, ŝi deŝiris siajn harojn kaj sian veston.

- Kion li faris al vi ? Vi murdisto! - La majoro klopodis ekspliki tion al ŝi.

- Ni ne povas toleri, ke iu mortigu siajn proksimulojn nur tial ke ili iom maljustis kontraŭ li. Kaj krome ankoraŭ per moderna teknikaĵo. Li estis idioto.

- Kaj kion vi faras? Kiom da homoj vi mortigas en Londono per viaj raketoj? Kaj kiu el la angloj malutilis al vi eĉ nur iom ? Vi havas nenian argumenton por viaj murdoj. Vi ĉiuj estas idiotoj, ĉiuj... - Von Schwarz volis ŝin aresti ĉi-momente, sed jen eksonis la sirenoj.

- Ne estas necese. - La majoro kriis en la telefonon. - Ne estas necese alarmi. Mi likvidis la danĝeron...

Responde komencis faladi bruligaj bomboj sur la loĝatan parton de la urbo. La aliancanoj malkovris la sekreton de Xeenemuende. Kvarono de la loĝantaro pagis per vivoj la unuan flugatakon. Ankaŭ inĝeniero Habicht. Iuj diras, ke estas domaĝo pri li. Laŭdire li estis eminenta teknikisto. Unu el la fondintoj de la raketaĵ armiloj. Geniulo.

Notoj de la tradukinto:

1)legu: kseneminde - 2) netrovebla en PV kaj Supl., mensmalforteco - 3) legu: habiĥt
4)legu: bretŝnajdr - 5) legu: fon ŝvarc - 6) legu: fergeltungsvafe cvaj, t.e. revenĝa armilo du, mallonge V 2, legu fau cvaj. - 7) nomoj de frandaĵoj - 8) legu: rajtpajĉ, t.e. rajdista vipo - 9) speco de Hitleraj soldato-trupoj.

La Tabuo

Mi estas egoisto. Neniam mi kontestas tion kaj ne disputas, kiam oni riproĉas tion al mi. Ja mi estas granda egoisto kaj pensas nur pri mia utilo. Nur dank'al mia egoismo mi povis forlasi periferion de Chicago, kie miaj gepatroj ĝis hodiaŭ vegetas kaj miaj gefratoj helpas masonistojn ĉe konstruado. Ja nur tial, ke mi pensis unua-loke pri mia utilo, fine mi povis finstudi universitaton kaj akiri akademian titolon.

Sed mi elektis malĝustan fakon. Amasoj da junaj viroj ĵetis sin al medicinaj studoj post la dua mondmilito, kiam paco ne volis veni kaj estis probable, ke sanitaristaro protektos siajn anojn ĉe pluaj konfliktoj. Krome, eĉ prifinancaj konsideroj ludis gravan rolon. Sed kiam subite eksvarmis tiom da kuracistoj, la honorarioj malaltiĝis kaj la sanitaristoj havis plej grandajn perdojn en Koreio, ĉar ili devis iri en la unuajn liniojn. Ĉi tion mi nur aŭdis. Mi mem ne estis en Koreio - feliĉe. Sed mi ne kapablis havigi al mi monon - malfeliĉe.

Kaj tial mi estis finfine kontenta, ke mi ricevis postenon en urba akuŝejo, kie la ĉefkuracisto permesis al mi, baldaŭ post enposteniĝo operacii eĉ la plej gravajn kazojn. Min interesis ginekologiaj operacioj kaj malnormalaĵoj. En la urbo mi ne havis eĉ unusolan amikon kaj baldaŭ mi devis konatigi mian nomon. Post unu jaro mi povis operacii per cezara tranĉo eĉ en mallumo. Kaj eksteruteran gravedecon mi traktis same rapide kiel la ĉefkuracisto. Mi kapablus tion fari eĉ pli rapide, sed mi ne volis malamikigi mian ĉefon. Sed fine mi ne evitis ankaŭ tion kaj foriris en malfavoro. Ĉar venis flegistino. Ŝi aspektis kiel anĝelo, al kiu mi preĝadis en infanaĝo. Sed ŝajnis, ke ankaŭ mia ĉefkuracisto iam estadis piulo. Kaj krome, li posedis propran aŭton. Sed mi operacias tamen pli rapide ol li. Kaj en la operaciejo kaj en la vivo... Post tri monatoj li elĵetis nin ambaŭ. Ĉi-foje mia egoismo malutile efikis kontraŭ mi.

Nome, mi devis akcepti postenon en porindiĝena hospitalo. Nenio alia restis tiam al mi. Dum la tuta vojaĝo ni ĝojatendis ekzotikan naturon kaj belajn loĝantojn. Vane. Preskaŭ eĉ ne unu paŝon ni eliris el la hospitalo. La akuŝa departemento estis en terura stato, ni devis labori tagnokte. Ankaŭ ekzistis nenio, kien iri. Nia hospitalo distancas okdek kilometrojn de unusola urbo en tiu ĉi regiono, la urbo havas unusolan straton kaj unusolan stacidomon, kiu kunigas nin kun la mondo. Nur ĉe specialaj okazoj ni veturas tien en unusolan kinejon aŭ hotelon. Malofte. Ĉi tie ĉiu malmulte elspezas, ĉar neniu volas resti ĉi tie. Ni volas laborgajni. Kaj dumtempe ni dediĉas nin al la praktiko, ni flegas indiĝenojn, kies lingvon neniu komprenas, ni ekzerciĝas ĉe viva materialo. Ni ĉiuj klopodas malkovri ion interesan, per kio ni povus atentigi pri ni ekstere en la mondo.

Jam mi opiniis, ke mi havas ion tian. Dum la mallonga tempo, kiam mi laboris ĉi tie, mi konstatis, ke ĉe la ĉi-tieaj akuŝantinoj altprocente aperadas malnormalaĵoj. Multe kaj multe pli ofte ol aliloke. Naskiĝas abortuloj. Kaj ĉiumomente pli multaj. Mi pri-skribis miajn kazojn kaj sendis la informon en la ĉefurbon. Longe mi atendis respondon. Mi urĝigis ĝin kelkfoje. Kaj tamen mi scias tute certe, ke profesoro K., kies prele-gojn mi vizitadis tiel diligente, havas specialan intereson pri miskreitoj kaj monstroj. Ĉe li mi vidadis la raraĵojn - infanon sen kapo, kun akvocerbujo, tumorojn pli grandajn ol la tuta feti, tiel nomatajn kunkreskintajn ĝemelojn, grandkreskintajn aŭ maceritajn fetojn - raraĵojn, kiuj estas ĉi tie ĉiutagaj kaj kies fotojn mi sendas nun al li. Fine mi persvadis mian edzinon, ke ŝi ne bezonas novan kostumon, kaj per la mono mi forveturis ĉefurbon al kliniko. Ja temis pri mia estonteco kaj pri mia nomo. La malkovro ja estas sensacio! Sed profesoro K. alkriis min. Jam de longe la malnormalaĵoj ne interesas lin. Pro ili li ne volas difekti sian trankvilan dormon. Nun li laboras

pri sendolora akuŝo. Kaj al mi li konsilus la samon. Preskaŭ li elĵetis min el sia loĝejo, kiu brilis de nova lukso. Antaŭ kelkaj jaroj profesoro K. uzadis principe ĵurnalojn anstataŭ ŝtrumpetoj kaj laŭdire loĝis en mansardo.

En redakcio unue oni tute ne volis mian kontribuaĵon eldoni. Kiel mi imagis la aferon, atakis min iu sekretarieto, ĝis lia nazumo eksaltetis, ĉu mi eble volas, ke tia estimata scienca gazeto enpresu ĉiun ajn informon pri nuda efektivaĵo? Laŭ li, mi pliprofundigu mian verkon, kompletigu ĝin per fontoj kaj datoj, statistikaj ciferoj kaj citaĵoj de fakuloj, inkluzive teoriantan eksplikon, kaj poste, post iu jaro - se mi havigos rekomendon de aŭtoritatuloj - estos eble paroli pri publikigo. Mi eltiregis miajn paperojn el la mano de la babilulaĉo.

Intertempe mia edzino havis viziton. Venis al ŝi du sinjoroj kaj tre ĝentile demandis, ĉu estas vero, ke ŝia onklo estas enkarcerigita pro artifiko kaj kial ŝi ne menciis tion ĉe la akcepto en la hospitalo? Mia edzino respondis, ke neniu demandis ŝin pri tio. La sinjoroj nur levis la brovojn, salutis kaj foriris. Sed Maria maltrankviliĝis. Kiam mi revenis, ŝi ne havis monon por kostumo kaj mi ne havis mian gloron. La manuskripto kaj la fotoj kuŝis sur la tablo en aktaĵoj. Ekstere estis terurege sufoke. Aerumilo ĉe plafono ne funkciis. Mi ne plu scias, kiu el ni du promesis mendi riparon. Ni ekkverelis pro tio. Ĉi estis nia unua kverelo.

Duan tagon oni vokis min al la direktoro. Li estis la plej potenca homo en la hospitalo, kaj ĝis nun li apenaŭ respondis miajn salutojn. Nepre mi ne sentis min bone, kiam mi atendis en parada laborejo. Ambaŭ sekretariinoj ne volis diri al mi, pri kio temas, kaj al miaj ŝercoj ili respondis malserene.

Sed la direktoro laŭte ridegis. Sidigis min en brakseĝon kaj proponis al mi cigaron, li fumis cigarojn pro antaŭtimo, ke lin trafus pulmkancero sekve de karbigado de cigaredpaperetoj - proponis al mi cigaron kaj komencis. Tio estis inundo da vortoj kaj flataĵoj. Ke li tute ne sciis, kian eminentan fakulon li havas en sia hospitalo, ke li estas surprizita pro mia modesteco kaj iomete ofendita, ke mi ne portadas miajn sciencajn verkojn unue al li. Ĉu mi eble pensas, ke rentgenologo ¹⁾ ne komprenus la interesajn problemojn de akuŝoscienco? Li interesiĝas pri ĉio. Kaj li proponis, ke li presigos mian kontribuaĵon en provinca gazeto. Sed mallongigitan kaj kun sia klarigo. Li volas dokumenti per mia verko sian propran temon pri degeneriĝo de ĉi-tieaj indiĝenoj. Ja eĉ proponis al mi, ke mi povas en libera tempo pruntepreni lian aŭton. Mi dankis al li.

Mi atendis en la aŭto de la direktoro antaŭ laboratorio, kie nun laboris mia edzino. Longe mi atendis. Kaj meditis dum la tuta tempo, kial povas la degeneriĝo progresi tiel rapide ĉe la bedaŭrinduloj. Ja la malnormalaĵoj tiel rapide plimultiĝas! Tio estis nekredebla.

Kun la edzino ni ekveturis en la regionon. Nia unua ekskurso. Baldaŭ ni interpaciĝis. Ŝi ne scipovas koleri. Sed la pejzaĝo ne plaĉas al ŝi ĉi tie, ŝi konfesis. Ŝi ne sentas sin bone, de la momento kiam ni alveturis. Tia laca kaj malgaja, ĉio ĉirkaŭe kvazaŭ deprimas ŝin ĉi tie. Estas ĉi tie malserena pejzaĝo. Mi ĉirkaŭrigardis. Nome mi ankaŭ sentas laciĝon ĉe laboro, sed tion mi klarigis per ŝanĝo de klimato. Cetere kia malsereno. Ĉiuj enviis al ni, ke ni veturas ĉi tien. Paradizo sur la tero - diradis vojaĝistoj. Post momento ni ĉesis paroli. Efektive tio ne estis feliĉa ekskurso. Ia stranga senventeco regis en la tuta regiono, ni renkontis kelkajn bestojn, kiuj eĉ ne forkuris antaŭ ni, kvazaŭ ili estus tiel malsovaĝaj, aŭ tiel pellacigitaj. Mi ne scias.

Fine ni haltis en iu vilaĝeto. Mi volis tie preni benzinon. Sed nenie estis ĉerpejo. Antaŭ unu dometo ludis malgranda hundido. Io venis en mian kapon. Eble estos Maria pli gaja. Mi volis aĉeti la hundidon. Ĝi estis ia miksrasulo kun longaj oreloj kaj mallongaj piedetoj, ĉarma kreitaĵo. Sed la posedantoj eĉ ne volis aŭdi pri la vendo.

- Kial? Ĉu ĝi estas ia rara raso? - mi demandas.

- Ĉiu hundido estas ĉe ni raraĵo - diris interpretisto malgaje. Kaj li montras al la tuta vilaĝo. Mi konsterniĝis. Dum reveturado mi tute ne ekparolis, kvankam mia edzino iĝis pli bonhumora. Ĉu estas eble, ke en tiu ĉi regiono okazus ankaŭ degeneriĝo de hundoj?

Kaj poste ni renkontis transportvicon. Intence mi haltis ĉe la lasta kamiono. Mi petis de ili benzinon. La soldatoj havis specialajn blankajn uniformojn, kiajn mi ĝis nun nenie vidis. Sed ne ŝajnis, ke almenaŭ unu el ili ekridetus.

- Kien vi veturas? - mi demandas ilin, sed ili mienas, kvazaŭ ili ne komprenus; nur iu malaltulo sin turnis al mi kun acida rideto. Li preskaŭ rikanas.

- Por fungoj! - li respondas. Kaj tuj iu ekkrias al li de sur la aŭto. Ili veturigas iajn strangajn objektojn, kovritajn per teksaĵo. Ĉiu aŭto veturigas ion alian. Grandan montrofigron, celantan kontraŭ ĉielo, longajn ŝtupetarojn, strangajn pligrandigaĵojn de infanaj konstrukubetoj. Estis kelkaj dekoj da aŭtoj. Mi havis sufiĉe da peno por preterantaŭi ilin.

- Kion li pensis per tio? - demandas mia edzino maltrankvile.

Sed mi ne volis vane ŝin timigi. Estis evidente, kiajn fungojn li pensis. La eksplodojn. Mi retrorigardis. La vico restis malantaŭ ni, moviĝis malrapide en la valo kiel kolosa, grizverda, venena miriapodo. La unua venena besto, kiun mi ekvidis en tiu ĉi regiono.

Komencis pluvi. Antaŭ la domo mi ne volis ellasi mian edzinon el la aŭto. Ŝi volis kuri por prepari vespermanĝon, ordigi, spekti la televidajn programojn, ni preskaŭ ekverelis. Mi ne ellasis ŝin en la venenan pluvon. Kaj jen ŝi komencis min kisi. Ŝi komprenis mian retenadon alie. Nome, en tiu momento mi eĉ ne pensis pri kisoj, sed mia edzino estas tre bela kaj eĉ nun ni estas enamiĝintaj, kvazaŭ ni eĉ ne estus geedzoj. Ni restis en la aŭto ankoraŭ, kiam la pluvo jam de longe foris.

En la operaciejo oni ne atendis min. Ĉiam mi lasadis ĉe la akuŝoj la asistantinojn. Mi ne povis ellitiĝi ĉiufoje, ĉar mi ne satdormus. Cetere, ĉe normala akuŝo estas kuracisto tute nebezona, kiel mi diradas. Tie necesas nur malgranda flego. La homaro konservadis sin sen akuŝejoj dum longaj jarmiloj. Ofte mi konsideras min nura spektanto ĉe stranga mistero. Kiel spektanto, kiu povas pli eble ion nur difekti. Kaj tial mi ne venis pro akuŝo. Mi serĉis libron pri statistikoj. Registrojn pri akuŝoj antaŭ du jaroj. La tiaman procenton de miskreitoj. Sed la libroj ne estis tie. La direkcio forprenis ilin laŭdire jam pasintjare.

La naskantino en la operaciejo preskaŭ tute ne kriis. Tio estas stranga afero, oni diradas ĉiam, ke ŝi krias ĉe naskado des pli multe, ju pli malmulte la popolo estas kultura. Kaj ĉi tiuj estas sur malalta ŝtupo. Mi restis ĉe ŝi. Ŝi kaptis mian manon, ĝis mi ektimis. Kvazaŭ mi povus protekti ŝin. Mi ... Mi ordonis alveturigi oksigenon kaj laŭbezone injekti por plifortigi la dolorojn. Ĉar laŭ la akuŝoscienco oni plifortigas la dolorojn pro kompato - iam.

Naskiĝis infano nur kun vizaĝo, la kranio ne evoluis. Post kelkaj minutoj la kreitaĵo mortis. La patrino ekploris, ŝi plorsingultis mallaŭte, ĝeme kaj plende, kaj poste en sia lingvo ŝi malbenis nin.

Mi kuris al la direktoro. Ĵus li havis gastojn. Altrangajn oficirojn kaj tri maljunajn profesorojn, fizikistojn, kiujn mi konis laŭ fotoj en ĵurnaloj. Ili vizithaltis dumvojaĝe. Tie mi parolis dekomence malrapide kaj prudente, poste pli kaj pli rapide, ĝis ĉefine mi kriegis. Tute mi difektis ilian amuzvespereton.

- Kiel longe vi volas sekretigi tion? La miskreitojn? Vi miskreitoj... Oni ne permesis al mi finparoli. Oni silentemigis min. Unualoke, onidire ankoraŭ neniu pruvis, ke tio estus sekvo de radiado.

- Mi pruvos tion! Donu al mi nombron kaj forton de eksplodoj, donu al mi la institutan statistikon kaj mi pruvos al vi ĉion, eĉ ĉiujn tumorojn de ostoj, leŭkemiojn kaj ceterajn tumorojn mi klarigos al vi...

Due laŭ ili - eĉ se mi pravus - la proveksplodoj, kiujn oni preparas, estas preparataj pro pli alta intereso. Kaj laŭ ili - kiu pli valoras? La ĉi-tieaj indiĝenoj aŭ la tuta homaro? Ĉar tiuj ĉi proveksplodoj servas al defendo kaj savo de la tuta homaro...

Ekinstruis min serioze maljuna profesoro kun okulvitroj, tiel maljuna, ke eble efektive li kredis siajn vortojn. Ili konsekris sin al la savo de la homaro. Kaj tia granda tasko postulas oferojn. Ili volas konservi la pacon.

- Tio certe sukcesos. Nome, la mortintoj ne emas militi. La mortantoj apenaŭ militos...

Kaj mi iris for. Ĝa eble mi eĉ frapfermis la pardonon. Ekstere haltigis min du ĝentilaj sinjoroj. Ĉu mi - ili diris - scias pri tio, ke mia edzino havas onklon kaj mi havas mian edzinon? Ĉu estas - ili diris - al mi konate, ke ŝia onklo ie kaŝis defraŭditan monon? Kaj eble - ili diris - ĉu li ne kaŝis ĝin ĉe sia nova parenco?

- Ne! diris mi ekscitite. Ili dankis kaj atentigis min nur, ke kompreneble - lige kun priesplorado de la onklo - mi devas esti preparita por kio ajn. Ĝa eĉ por la plej malbona. Kaj ĝentile ili adiaŭis.

Hejme atendis min la direktoro. Li ne koleras kontraŭ mi, kvankam mi difektis tian gloran vesperon. Estas granda afero, pri kiu oni laboras ĉi tie, la savo de la homaro. - Kaj ne ĉiu maturiĝis por la tasko. Li proponas al mi plej bonajn kondiĉojn ĉe la plej bona laborposteno en la ĉefurbo.

- Por kio?

Por tio, ke mi ĉesu okupiĝi pri la monstroj. Mi rememoris pri profesoro K. kaj lia luksega loĝejo. Kaj mi elektis sendolorajn akuŝojn.

- Eminente! - konsentis mia direktoro. - Vi povas forveturi tuj morgaŭ. Se vi subskribos deklaron. Mi subskribis. Mi forgesos ĉion.

Mi malŝtopis botelon kaj trinkis glason post glaso. Mi ne scias, kie povis resti mia edzino. Mi ekpakis sola niajn aĵojn. Ni ne havis multon ĉe ni. Nur du kofrojn. Ĉar entute ni ne havis multe da posedaĵo. Tio ŝanĝiĝos nun. Mi trinkis glason post glaso. Kial mi zorgu pri la homaro? Mi estas egoisto, tion mi diras al mi dum la tuta vivo. Kiom interesas min la socio! Ĉi estu mortanta, nur se mi estos feliĉa. Ĉiuj mortaĉu. Ĉu oni zorgus pri mi, se mi estus mortanta? Oni konas tion. Oni kraĉus ankoraŭ. Cetere kiel mi povus spiti? Kiel? Mi estas tiel dependa de la ceteraj, de la socio, ke kiam mi frotbruligas alumeton, turnas komutilon aŭ malfermas konservaĵon aŭ surprenas ŝuojn, per tio mi promesas obeemon al la socio, per ĉio ĉi mi demonstras mian dependecon, mian subulecon. Necesas esti almenaŭ radeto, kiu en la granda maŝino turniĝas plej malrapide. Sed ĉu la radeto povas influi vojdirekton de granda tanko? Ni veturas en abismon. Kion fari, jam ni ekveturis kaj la rapideco akceliĝas...

Mi malfermas pardonon de la litĉambro. Mia edzino ne estis for. Ĝuste nun ŝi vekiga. Apud si havas amaseton da citronoj.

- Mi volus kukumon. Aŭ sardelvolvaĵon kun cepo...

- Por kio?

- Por manĝi - kaj ŝi ekmienas kulpe.

Nur akuŝisto ne divenas ĉe propra edzino, kion signifas tiaj apetitoj. Nur al akuŝisto oni devas klarigi, ke oni veturis en la urbon al la konkuranto, por ke la diagnozo estu certa. Nur al akuŝisto oni devas diri rekte:

- Mi havos infanon.

Mi konsterniĝis. Mi rememoris pri la pluvoj, pri tio, kiel longe ni estas en tiu ĉi regiono, kaj pri ĉiuj miaj miskreitoj. Mi ne volas havi infanon sen kapo! Mi ne volas havi senvivan infanon! Almenaŭ venonte jam ne! Ĉar mi estas egoisto. Kaj tial mi skribas tiujn ĉi liniojn. Ĉar mi estas ja granda egoisto kaj pensas nur pri mi.

Neniu miru, ke mi ne nomis la regionon kaj la hospitalon, kie ĉio ĉi okazis. Tio povas okazi kie ajn. Kaj baldaŭ!

Cerbo de Einstein

- La situacio estas nemezureble serioza, - finis akademiano Koĵevkin. - Dum kelkaj pasintaj generacioj, niaj teknikaj fakoj liberigis la homaron, senigis ĝin de laborego, de malsato kaj de militoj, ni malfermis la pordegojn de la universo. Ankoraŭ mi memoras la tempojn, kiam inĝenieraj fakultatoj elektadis nur la plej bonajn el la plej bonaj, kiam studado de la teknikaj fakoj estis sopirata de ĉiu juna homo. Kaj hodiaŭ? La junularo perdas intereson pri nia laboro. Subite kvazaŭ fiziko, matematiko kaj kemio ne interesus ilin. Ĉe nia altlernejo en Alma-Ata anoncas sin ĉiam malpli da lernantoj por tekniko. Ekzistas danĝero, ke post kelkaj jaroj ni estos devigataj limigadi la esplortaskojn kaj malplinombrigi la laborlokojn. Tian staton oni ne plu povas toleri. La maŝinoj ne laboros mem, ili ne zorgos pri la homaro sen ajna inspektado, necesas energiaj intervenoj.

Ni aplaudis kaj la akademiano eksidis.

- Ĉe ni en Toronto statas la aferoj eble ankoraŭ pli malbone, - diris profesoro Clark Smith Jones. - Jam ni estis devigitaj fermi la fakojn por iuj aparte specialaj problemoj pri la spaco kaj por esplorado pri la substanco de la elementaj eroj. Kontraste, ĉe prelegoj pri Goethe aŭ pri priartaj opinioj de Herder la junularo interpretiĝas, ni devis disponigi la institutan gimnastikejon al nia estetikisto, kvankam, fondante la universitaton, ni preskaŭ forgesis establi tiun fakon. Sed plej malbone estas, ke ni apenaŭ povas imagi, kial okazis tiu ĉi ŝanĝo. Ĉu ĝi estas la natura sopiro de la juna generacio, ribeli kontraŭ la gepatroj kaj fari ion alian ol ili? Aŭ ĉu ĝi estas ia senkonscia protesto, - nun profesoro Koĵevkin ekridetis, - kontraŭ ciferoj kiel simboloj de ordo, kaj do ankaŭ de la patra aŭtoritato? Niaj psikologoj okupiĝas jam longe pri la problemo, sed senrezulte, bedaŭrinde.

Ni aplaudis kaj la profesoro eksidis. Sekvis senkonsila silento. Neniu volis paroli plu. Oni timis. Kaj tamen, la kaŭzoj de la ŝanĝoj estas klaraj jam delonge. Mi anoncis min.

- Ni devas neniel primensogi nin - diris mi rekte - . Simple, ni estas ĉe la fino. En senelira strateto. Ekde la fino de la deknaŭa jarcento, la teknikaj sciencoj certe transformis la mondon, enombrigis ĉiujn ceterajn fakojn, ebligis, ke la homoj dediĉu sin nur al vere gravaj taskoj kaj tiel plu, kiel ni ĉiuj bone scias. Sed la esencajn problemojn ili ne solvis. La homoj eĉ hodiaŭ demandas, kiel kaj kial vivi, eĉ hodiaŭ ni scias nenion pri la komenco de la universo, eĉ hodiaŭ ni ne kapablas ekkompreni la kvaran dimension, kiun elkapigis Einstein. Kiam ajn ni metas tiun ĉi demandon al niaj cibernetikaj maŝinoj, ili eliminas ĝin kiel nesciencan, kiel erare stilitan, tro personan, privatan, homecan. Sed ĉi tiuj problemoj ne estas tial malpli gravaj por ĉiu el ni. Profesoro Jones, eĉ akademiano Koĵevkin, posedas la plej inĝeniajn laboratoriojn, iliaj artefaritaj cerboj solvas dum tri sekundoj la taskojn, kiujn lertaj matematikistoj devus kalkuli dum tuta aĝo, sed la fundamentajn demandojn ili ne respondas. Kaj tiel ni aperis en sorĉita cirklo. Fiziko fariĝas aplikata scienco, ĝia dependeco de filozofio estas ĉiam pli evidenta, simile kiel kroĉtrikado de la punktoj estas dependa de pentroarto. Kaj ĝuste tial ni perdas la junularon. Ni ne okupiĝas pri la esencaj aferoj. Ni finos tie, kie ni komencis. Nuntempe ni konstruas aparatojn, kiuj kapablas lerte lavi, kuiri, operaciigi aŭ flugi en la kosmo, kiel antaŭ jarcentoj niaj antaŭuloj konstruis mekanikajn pianistojn kaj artefaritajn ursojn. Ili montradis siajn inventaĵojn en la cirkoj. Pensantaj homoj konsideris ilin ludilproduktantoj, ĉarlatanoj. Al ni minacas la sama sorto. -

Neniu aplaudis al mi. Eble mi iom trohastiĝis. Jones nubmienis. La ceteraj kolegoj debatis duonvoĉe. La bruo en la salono plifortiĝis.

- Ĉu miaj maŝinoj ne plaĉas al vi? - eksaltis profesoro Jones. - Ili estas, - li rive-rencis, - krom la cerboj de akademiano Koĵevkin, la plej perfektaj cerboj en la mondo. Neniu el la ĉeestantoj havas tian cerbon. Eĉ vi ne, estimata koleginino...

- Mi ne pensas tiel rapide, nek tiel fidinde, tio estas vero. Sed mi kapablas malkovri

novajn taskojn, mi kapablas okupi ĉiujn viajn aparatojn per miaj duboj kaj malscioj, kaj plaĉas al mi la sunsubiro...

Jones ironie ridetis. Kvazaŭ li bedaŭrus, ke li ekdisputis kun ne tro konata laborulino. Li, la scienca eminentulo.

- Efektive la kvaran dimension ne kapablas ekkompreni niaj cerboj, la misteron de la kosmo ni povas efektive nur priskribi, - konfesis Koĵevkin - kaj estis videble, kiel li bedaŭras tion. El la vidpunkto de fizikaj sciencoj estas la demando ankaŭ erare metita.

- Kaj ĝuste tial mi proponas konstrui biologian cerbon, - diris mi al ili, - kiu estus pli homeca ol la mekanikaj maŝinetoj, kiu kapablus percepti. Efektiva maŝino por ekkonado.

- Ĉu cerbo de Einstein? - denove ekridetis Jones malfide. Lia ŝerco donis la nomon al mia eksperimento. De tiu tempo oni parolis pri ĝi kiel pri la konata afero kun la cerbo de Einstein.

Mia plano estis simpla, jam antaŭe mi konsiliĝis pri ĝi kun fiziologoj kaj biologoj. Kun helpo de specialaj aparatoj ni trovu la tri plej laborpotencajn cerbojn de ĵus mortintaj homoj kaj per speciala metodo ni "densigu" ilin en unu organon, kiu, post revivigaj procedoj, estus instigata al la agado per elektro.

Je la tago de mia eksperimento mi dissendis miajn asistantojn, provizitajn per specialaj raciometro, en ĉiujn hospitalojn de la regiono. La plej laborpotenca cerbo montrigis tiu de iu profesoro pri arkitekturo, kiu mortis falinte de sur konstrutrabaro, de iu malmulte konata poeto, kies cerbon ni uzis, memorante la aforismon de Einstein, ke imago-povo estas pli grava ol scioj, kaj trie cerbo de Agnesa Novák, kiu pereis ĉe trafikakcidento. Longe ni meditis super ŝia kapo. Ŝi estis dommastrino, patrino de familio, en la vivo ŝi plenumis nenion rimarkindan, kaj tamen niaj aparatoj signalis, ke ŝia cerbo posedas la plej grandan kapablon. Fine ni kredis al ili kaj ekis densigan procedon, kiu kompreneble estis malrapida kaj peniga. Sed ĉio laŭplane sukcesis kaj mi povis komenci la propran eksperimenton.

Mi prezentis al la cerbo la fundamentajn fizikajn ekvaciojn kaj ekincitis la kompetentajn partojn per elektro. Ŝajnis, ke la kurento estas siaspeca stimulo aŭ inspiro, post kiu la organo vigle elsendadis la solvon per specialaj antenetoj, lokitaj sur ĝia surfaco. Sur treege sentema reproduktilo ni ricevadis la solvojn, kiuj ŝajnis konfirmi iujn el la hipotezoj de akademiano Koĵevkin. Senprokraste mi telegrafis al Alma-Ata. La hipotezoj de Koĵevkin estis publikigitaj en fakaj gazetoj nur antaŭ nelonge. La profesoro de arkitekturo, la poeto kaj la dommastrino certe ne atentis la prifizikajn gazetojn. Do ŝajnis, ke mia cerbo memstare "malkovris" la hipotezojn.

La sekvintaj semajnoj pasis en nura ĝojo. La cerbo produktis pluajn solvojn, disvolvis la hipotezon de Koĵevkin, kombinis ĝin kaj faris konkludojn, kiujn eĉ la akademiano ĝis nun neniam publikigis. Sed aperis unu difekto. Ĝi laboris neregule. Tio kaŭzis al mi zorgojn. Kvazaŭ ĝi ne volus kutimiĝi al orda labortempo. Ĝi ne plu respondadis senprokraste post la incito. Post ĝi, ĝi skribis iam nur ian malsaĝaĵon, kvazaŭ ĝi volus ŝerci, alifoj ĝi laboris nokte, kiam mi ne estis en la laboratorio, kvazaŭ ĝi "kaŝadus" la liveritan energion.

Post monato ĝi ĉesis tute labori. Ĝi "vivis", por ke mi esprimiĝu klare, tio signifas, ke en ĝiaj histoj funkciis kombinita metabolismo, pri kiu zorgis alia aparato, sed la elektraj impulsoj ne kapablis plu laborigi ĝin. Ŝajnis, ke la eksperimento malsukcesis.

Kaj ĝuste tiam mi ricevis leteron de akademiano Koĵevkin. Li sendis al mi sian lastan verkon, kiun li publikigos venontmonate en la gazeto Scienco. Ĝi konformis kun la laboro de la artefarita cerbo. Ŝajnas, ke kaj la akademiano kaj mia artefarita organo fine trovis la ĝustan vojon al la solvo de la principa problemo. Kaj ĝuste ĉi-momente la cerbo strikas. Mi meditis, kiel ripari ĝin. Kaj tiam al mi venis la penso, elkonstrui specialan aranĝon, per kiu ĝi povus "paroli", tio estas, rekte dikti siajn rezultojn kaj ĉe tio komuniki ankaŭ la ceterajn pensojn. Mi scias, ke ĝi aspektis iom horore. Sed se ni disponigos al la cerbo iun ĝenerale konatan viran voĉon, ekzemple voĉon de televida anoncisto, la efekto ne estos tiom timiga. Post kelkaj tagoj mia cerbo povis "paroli". Kaj kiuj estis ĝiaj unuaj vortoj? Ili nepre ne koncernis la sciencajn hipotezojn.

- Vi neglektas min... ĝi diris.

Tio estis surpriza. Mi pensis, ke elektra incitado kapablas substitui kian ajn rekompencon. Subite estis klare, ke eĉ nun ni ne estras plene la afekcion, ke eĉ nun ni ne kapablas substitui per iu elektrokemia reago la senton pri sekuro kaj plaĉo, la senton, kiu al homo donas lian rilaton al proksimulo. Tio estis la unua konstato en mia eksperimento. Kaj mi devis uzi la plej malnovan manieron. Mi komencis persone prizorgi mian organon. Mi ekloĝiĝis ĉe ĝin en la laboratorion, mi interparolis kun ĝi de mateno ĝis nokto. En la instituto oni ne komprenis min. Unuj asertis, ke mi estas sekrete enamiĝinta en televidan paroliston kaj ke mi debatas kun lia voĉo, la aliaj opiniis, ke mi frenezas.

Sed la cerbo kaj mi bone interkomprenis nin kaj mi mem iam notis ĝiajn rezultojn, kiam diktafono difektiĝis. Sed post dekkvar tagoj venis plia perturbo. Ŝajnis al mi, kvazaŭ ĝi "ekscitiĝus". Senĉese ĝi alkriadis min per unu kaj la sama ekvacio kvazaŭ en grandega furiozo. Mi estis pacienca, longe mi parolis kun ĝi. Ja ĝi devas esti prudenta, se ĝi havas tian kapablon, tia cerbo. Kaj tiam mi konsciiĝis, ke mi fakte parolas al iu estulo, ne plu nur al la funkcia izolita histo. Subkonscie mi elpensis kreitulon kun tia cerbo.

Kaj ĝuste tion ĝi volis. Unue la elektraj impulsoj, poste daŭra prizorgado, ĉi ĉio estis malmulte por ĝi. Ĝiaj unuopaj cirkvitoj, per kiuj ĝi antaŭe vidis, flaris kaj sentis, sopiris ankaŭ agadon, ili volis esti okupataj samkiel ĝia spekulativa talento, ĝi volis tutan organismon, kun ĉiuj sensoj, inkluzive haŭton.

Sur tiu ĉi loko mi volas akcenti, ke mi progresis en la plua eksperimentado nur post la plej matura rezonado. Sed jam tro multe estis vetita. Kaj la eksperimentaj kirurgoj bonvenigis, ke ili povas konsistigi homan korpon el siaj artefaritaj materialoj, el kiuj ili formis ĝis nun nur mankantajn membrojn kaj organojn. Komprenoble ni ne sciis, kian vizaĝon doni al ĝi. Kaj tial anstataŭ vizaĝon ni lasis elegantan bandaĝon, en kiu ĝi aspektis kiel homo resaniĝanta post averio.

Kune ni revenis en la laboratorion. Ĝi estis "feliĉa". Ĝi fajfetis iajn melodiojn, kiujn eble iam konis la malmulte konata poeto. Ĝi stariĝis al fenestro kaj de tie rigardis la riveron, kiu fluas ne tro fore. Ĝi tute ne ekpensis, ke ĝi devus labori.

- Bela vidaĵo... - ĝi diris. - Fakte mi neniam konsciiĝis pri tio. Ĉiam mi rigardis en la librojn, kaj ne el la fenestro.

- Eble interesos cin, ke profesoro Jones... mi komencis diplomate.

- Li tardiĝis, - ĝi diris. - Li estas malsaĝulo, - kaj ĝi eksidis ĉe la tablo. - Mendu teatrobiletojn por la vespero.

Iom mi ektimis. Ĉu ĝi eble volas vizitadi kun mi eĉ la socion? Denove mi informis min pri la profesoro de arkitekturo. Laŭdire, li ne ŝatis teatron. La poeto laŭdire vizitadis nur koncertojn. Ŝajnas, ke ni lasis neproporcie grandan kvanton da Agnesa Novák en mia organo. Sed ĉiu ajn jam tiutempe atentosekvis la laboron de nia supercerbo. Ĉefe tial, ke ĝi estis neinspektebla. La fakuloj disputis pri tio, ĉu la produktoj de mia organo estas aŭ iaj sensencaj aŭtomataj numeraj tekstoj, aŭ vere originala, ĝis nua neniam vidita ekkona agado de kvaroble potencigita homa cerbo. Al ili povis respondi nur la plua rezultoj. Kaj tial mi decidiĝis iri kun ĝi en la teatron.

Ĝi ridis pli laŭte kaj ploris pli multe ol kiu ajn inter la publiko. Ankaŭ al mi la teatraĵo plaĉis. Mi vizitadis teatron nur malofte. Mi havis tion da laboro en la laboratorio. Nur ke post la prezentado ĝi volis iri hejmen ĉe min. Mi devis al ĝi klarigi, ke mi estas pli ol kvindekjara, ke mi havas grandan filinon, al kiu mi riproĉas ŝian vantaniman vivon, kaj ke mi ne povas alkonduki hejmen fremdan homon por la nokto. Intence mi diris la vorton "homon". Memkomprenoble ĝi tuj malgajiĝis. Kaj minacis, ke ĝi ne laboros plu, ĉar ĝi, siaopinie, ne havas por tio kialon. Nur tiam mi ekkomprenis, ke por sia ekkona laboro ĝi bezonas homajn argumentojn: konkuri kun Jones, min ami, vivi en familio.

Mia filino komence timis, ke venos fantomo, simila al fama Frankenstein, hororulo el neparolantaj filmoj, sed baldaŭ ŝi tute ekŝatis ĝin. Iam ja eĉ ŝajnis al mi, ke ŝi harmonias kun ĝi pli bone ol kun mi. Nome, ŝi estas stranga. Unue ŝi volis esti okupata ĉe unu el la lunistacioj kiel ŝia patro, de kiu mi ekzediĝis baldaŭ post la nupto, ĉar li ne komprenis mian sciencan agadon, poste ŝi volis fariĝi dancistino, sed por tio ŝi havas tro larĝan pelvon, almenaŭ mi pensas tion. Nun ŝi studas la ĥetidan lingvon, memkomprenoble nur tial, ke ŝi ne devu dediĉi sin al fiziko, ĉar ŝi ne volas fari al mi plezuron. Neniom ŝi eminentas en la ĥetida lingvo, pri mi en ŝia aĝo oni jam ĉie sciis. Plej malbone estas, ke nun ŝi atendas infanon kun iu nekonata junulo, kiun ŝi eĉ ne prezentis al mi.

Ŝajnis, ke mia artefarita cerbo laboras ankoraŭ malpli ol mia filino, pri tio ili bonege komprenis sin reciproke. Dum la tago ĝi skribadis ĉiam nur kelkajn liniojn, poste ĝi iradis en la parkon aŭ al la rivero bani sin. Kaj senĉese klarigadis al mi, ke mi devas amii mian filinon, tio ja estas memkomprenebla, ke mi devas ŝanĝiĝi kaj ke la laboratoria laboro ne estas ĉio. Argumentoj, kiujn oni aŭdas hodiaŭ ĉe ĉiu angulo. Pro ili mi ne devis elpensi specialan biologian sistemon. Sed ĝi konsilis ne nur al mi. Ĝi haltadis kun ĉiu, la homoj el mia domo komencis ĝin salutadi, respekte kaj de malproksime.

Do ĝi diktis al mi ekkonojn, kiuj jam eĉ ne estis ekvacioj, simbolojn, kiujn neniu ankoraŭ konis en scienco. Jones memkompreneble asertis, ke ĉio ĉi ne havas sencon, ke tio estas nur konfuzitaj, senkoheraj fragmentoj de ekkonoj el ĝiaj tri pasintaj vivoj. Kaj li publikigis sian opinion en la gazeto. Ĝi efikis kiel bombo. Tuj mi estis vokita al la estro de la esplorado, ĵurnalistoj volis intervui min, mia eksperimento fariĝis ĝenerale konata. Se ĝi ne sukcesos, mi perdos ĉion.

La supercerbo tute ne ekscitiĝis. Dum tiu tago ĝi skribis apenaŭ tri literojn.

- Kion ci volas? Kion ci volas jam denove? - mi diris senpacience kaj mi volonte eĉ dormus kun ĝi, se tio estus teknike ebla. - Ja ci fakte ekspluatas nin... - kaj mi metis antaŭ ĝin la artikolon de Jones.

- Mi volas nenion, - ĝi diris. - Nur tion, ke ci konduku laŭ miaj respondoj... - Mi ne komprenis ĝin. Kiel mi konduku laŭ la malkompreneblaj simboloj kaj skribaĉoj, pri kiuj mi mem jam dubis? - Mi respondos post tri tagoj, - ĝi diris kaj eksilentis. Ĝi rigardis el la fenestro, kvazaŭ ĝi volus koncentriĝi. Mi observis ĝin el mia ĉambro per speciala aparato. Dum la tuta nokto ĝi skribis du liniojn. Alie ĝi eĉ ne movetiĝis. Sed ĝi promesis, ke ĝi respondos. Do mi sendis senprokraste telegramojn al ambaŭ profesoroj, mi informis miajn estrojn. La eksperimento proksimiĝas al sia fino.

Sed la duan tagon ĝi eĉ ne ekparolis al mi. Ĝi sidis en sia ĉambro, kapon en manplatoj, "flustris" siajn ekkonojn per malfortiĝanta voĉo en diktafonon. Dum la nokto ĝi griziĝis. Ĉu eble estas la lasta fazo de la ekkono tiom elĉerpiga? Mi ne volis ĝeni ĝin. La trian tagon matene ĝi eĉ ne ekkonis min, vespere ĝi rigardis eĉ mian filinon per nekomprenemaj okuloj. Mi sidis apud ĝi la tutan nokton. Siajn ekkonojn ĝi jam nur raŭketis, eĉ la plej fajna diktafono ne kapablis deĉifri ilin. Je la tria horo ĝi "mortis". Je la sesa venis profesoro Jones. Je la oka, akademiano Kojevkin. Vane. Al sepulto.

Nome ni devis kremacii ĝin. Memkompreneble ĝi estus ŝetinda en rubejon kiel ĉiu alia maŝino, kiam ĝi difektiĝas. Sed dum la lastaj tagoj ĝi amikiĝis kun tiom da homoj el mia ĉirkaŭaĵo, ke mi nek povis nek volis klarigi al ĉiuj mian eksperimenton. La kremaciejo estis troplena, mi staris en angulo kun ambaŭ sciencistoj, kiuj devis rideti. Kiel facile eblas priruzi niajn proksimulojn. Ili venas al sepulto de maŝino. Oni rekomendis al mi, ke mi ripetu mian eksperimenton. Antaŭ la kremaciejo atendis min mia filino. Ŝi gratulis al mi.

- Ĉu vi ne komprenas, ke ĝi respondis? Ĝi mortis. Kaj antaŭe ĝi vivis: plene kaj saĝe, en amo kun sia ĉirkaŭo. Ĉu la vivo mem, kiun ni ne rajtas limigadi, ne estas la plej granda respondo? Kaj ĉu ne estas ĝuste la morto, post la vivo plene travivita, la plej granda saĝo?

Ŝi prezentis al mi sian fianĉon. Jam mi ekkomprenis, kial tiom malfrue. Li laboris ĉe la sama lunstacio, ĉe kiu iam deĵoris ankaŭ mia edzo. Li estis agrabla knabo. Ni ĉiuj tri iris kune hejmen. La tuta familio. Antaŭ semajno mi estus elŝetinta lin eĉ kun ŝi. Mi ne ŝatas la lunistojn. Kial? Mi ne meditis pri tio. Ankaŭ mi koncentriĝis dum la tuta vivo nur al mia cerbo, kiel tiom multaj aliaj. Eble la filino pravas. La malintegriĝo de mia biologica sistemo povis esti efektive ĝia formo de respondo. Sed la saman respondon donis al ni la cerbo de Agnesa Novák jam ĉe la komenco de la eksperimento. La arton vivi ni eble efektive neglektis en la lasta tempo. Ĝi estas arto, kaj ne scienco. Sed ĝi postulas la plej grandan saĝon.

Ŝajnis al mi, ke por tiuj ĉi ekkonoj sufiĉas eĉ cerbo de meze prudenta homo.

Kaj tial mi forlasis la eksperimentadon kun la biologiacaj sistemoj.